Klaus Groth,

# Vintra amo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

La prujno pendis en tili',
tra kiu fluis luma hel';
vidiĝis via dom' al mi
samkiel fe-kastel'.

Tra la fenestro vidis mi
en via ĉambro stari vin;
en la sunbrilon paŝis vi,
malhela vi fein'!

Printempan varmon sentis mi;
sed tuj min memorigis la
frosteca man-salut' de vi,
ke estis vintro ja.

*Traduko de la Germana poemo "Winterliebe" de* Klaus Groth *(∗1819-04-24 – †1899.06-01) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1984-02-28.*

*MR-071-2 / Arg-586-1181 (2012-12-30 18:42:36)*

*La poemo troviĝas ankaŭ en* `http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/vintra_amo.html` .